

BULTENO

de GERMANA ESPERANTA FERVOJISTA ASOCIO

Mitteilungsblatt der Vereinigung deutscher
Eisenbahner - Esperantisten im Bundesbahn - Sozialwerk



Fondita 1952

Numero 5

Novembro/Decembro 1982



26a GEFA-Jarkunveno en Friedberg



La urba halo



foto: W. Zietz

Per tiu ĉi numero BULTENO
faris sian 30an naskiĝtagon

Sunradio post diluvo

Vere la unua sabato de Oktobro favoris la 26an Jarkunvenon de GEFA. Pluvotorentoj kaj nebuloj ne timigis la 129 partoprenantojn el 10 landoj vojaĝi al la Heslanda Friedberg, kien GEFA invitis siajn membrojn, geamikojn kaj gastojn por semajnfina kunesto de la 15a ĝis la 17a de Oktobro.

De akcepto al akcepto

Kiel rapide la lokaj organizantoj en la stacidoma akceptejo pretigis la administraciajn formalizaĵojn, tiel haste devis kuri



Akceptejo en la stacidomo Friedberg bonvenigis la partoprenintojn

tra pluv-malsekaj stratoj la malfruintoj al la oficiala akcepto en la antikva urbodomo, ĉe la urbestro, kiu jam vendredon invitis la kunvenintojn. Agrablajn du horojn la tiel selektitaj gastoj pasigis en la tradiciplena salono, babilante kun bone informita urboĉefo kaj kun la magistratestro, cetere fervoja oficisto, pri la zorgoj de tia urbeto en la ombro de la metropolo Frankfurt kaj en vidproksimo de la mondfama kuraĉloko Bad Nauheim. Sole la nomo ja de Friedberg vekas imagojn pri mezepoka historio. Sed jam

romiaj familioj, soldatoj, komercistoj kaj metiistoj trovis ĉi tie agrablan sidejon sufiĉe for, sed aŭkaŭ ne tro malproksime de la imperia limo, fortikigita kontraŭ Keltoj kaj Germanoj.

Laste pasintajn dek jarojn bildon kaj ekonomion de la urbo decide gravuris ankaŭ fervojo kaj sukerindustrio, kiuj laŭ ĝenerala tendenco ne nepre prosperas plu. En anticipe simpatia etoso, ne dum starkunveno, tamen ankaŭ kun la arkaika, sed neevitebla interŝanĝo de gastdonacoj, komenciĝis la akcepto de la urbestro; bona ĉampano kaj instrua konversacio finis ĝin.

Lasta akcepto de tiuj tagoj por iuj GEFA-anoj ne estis tiel nepre bonvena. Kiu pro manko de loĝeblaj ne trovis liton plu en Friedberg, devis vole—nevole trapasii ian distancon buse—trajne—piede de Bad Nauheim ĝis la kongresejo en Friedberg. Konsolo sola estis la nobla najbareco: memortabulo sur la domo „Frankfurter Straße 33“ sciigas, kie en tiu ĉi urbo loĝis kurace d-ro L. L. Zamenhof en aŭtuno 1907.

Kiel traduki „Kniehebelschluß“?

Vi pravas, unue oni devas scii, kio estas tia fermilo, kiun celon ĝi havas, kion entute genu-artike ĝi fermas. Sed tio estas unu el la plej etaj problemoj de niaj fakterminaristoj. Multe da laboro estas jam farita: 14 literoj tute pretaj, 10 literoj nur ankoraŭ preparataj. Ni fervojistoj el ĉiuj branĉoj (kiom da profesioj havas la fervojo?), ni rajtas esperi, ke niaj diligentaj terminaraj komisionanoj gajnos la plurjaran vetkuradon kontraŭ la kompilantoj de la 6-lingva UIC-fakleksikono. Gustatempa aperigo de esperantlingva suplemento kun la noveladono de la UIC-vortaro estus ne nur granda venko por nia faka movado, sed ankaŭ vangofrapo por iaj obskuraj elementoj. Ĉu ni scias sufiĉe memfide taksii tion, ĉu ni kapablas ekspluati la venkon?

La kunsido de la laborkomitato (t.e. GEFA-estraro kun la komisiitoj) ne tiel larĝe traktis sole la faklingvan problemon, ĉar ampleksa programo atendis pridiskuton. Laborlingvoj, ĉi-foje ne diskutemo, kompreneble estas du: germana kaj Esperanto. Ankaŭ la raporto vere aprobas tion, komprenante pli klare Esperanton, ol hesan, ŝvaban, bavaran aŭ saksan lingvojn. Refoje la komitato laŭte pripensadis, ĉu tiu ĉi kunsido estu publika. Ĉu multaj interesuloj aŭ malpli partoprenus ĝin, ĉu kun aŭ sen voĉdonrajto, tute egale en tiu ĉi konekso. Nur, nomi ĝin publika, levus ĝin el nebuleco de organizo ne demokrate elektita, sed BSW-dependa. Eble nia pozicio en la hierakio inter personaro kaj administracio donus al ni pli fortan lokon, por taktike gajni terenon.

Sendube tio estas primitiva saĝo: varbado kaj instruo estas fratoj. Varbadon, kiun ni hodiaŭaj sinonime kutimas prononci

„informado“, ja nepre devas sekvi daŭriga informado, kiun ni nomas instruado. La anoncita nombro de kursoj kompare al la stagnanta membronombro evidencigas, ke ne ĉie tia konsekvenco estas memkomprenebla. Aŭ mankas la necesa anim-masaĝo? Aŭ ĉu ni preferas resti inter ni flegante la hejman dialekton en monataj kunvenoj? Aŭ ĉu nia delikata movetado estas jam tro neŭtrala, tro pala? Nia batalema Zamenhof ne estis neŭtralista.

La temo varbado ĉi-foje ricevis pli bonan lokon en la kunsidprogramo. La eŝo en la lokaj ĵurnaloj estis atentinda kaj afabla. Informstando en centra punkto de la urbo trovis multan intereson. 600 vizitantoj vidis la ekspozicion pri Esperanto, inter ili pluraj kursoj de blindula lernejo kun siaj geinstruistoj. Dankinda tasko, kontaktigi ilin kun la multaj blindaj infanoj, kiuj jam lernas la lingvon.



Propagando en la ĉefstrato

Kelkaj aliaj klopodoj ŝajnas bataloj kontraŭ donkiĥotaj ventomuelaloj. En „Wir“ fine, preskaŭ tro malfrue aperis pagita anonco kun informpropono, bedaŭrinde nur kun

unu privata poŝtadreso. Kosciante kiu kaj kiom kiel legas tiun gazeton, oni estas scivola pri la efiko kaj pri la sperto, ĉu valoras ripeti ion similan.

Kolego Kiefer, Bba Ffm, laŭdezure disponigos ankoraŭ 3000 4-paĝajn varbilojn A 5, kompilitajn speciale por junuloj fervojistaj. Same tie estas riceveblaj afiŝoj laŭbezone kolorigeblaj, por enpreseblaj informoj kaj adresoj, ĉ. 400 da A 4-formato kaj 500 da A 3. La afiŝoj estas vere artisme desegnitaj de Greta Deutsch en ŝia ĉarme skurila stilo memoriganta pri „art nouveau“ aŭ H. Vogeler. ILEI aprobis kiel bazon por leterkurso la lernolibron de H. D. Hartig „Esperanto eine lebendige Sprache“, da

kiu ankoraŭ kvantoj estas aĉeteblaj ĉe la GEFA-sekretario J. Schrapp. Tripersona komisiono prilaboras la leterkurson; ses lernpaŝoj estas jam disponeblaj.

Farita kaj jam en Friedberg uzata estis nova teksturbandego por la GEFA-Jarkunvenoj. Krome atendas utiligon nova stablaro kun tabuloj por kiu ajn ekspozicio; la eksponaĵojn oni mem fiksas surloke el propra stoko. Instigajn varbideojn ĉiam danke akceptas la estraro kaj ĉiu Bba.



Varbtabulo en la urbhalo

Datoj — lokoj — kunvenoj

La plej proksima evento, la skisemajno IFES limigita al 80 lokoj okazos en la Bavara Arbaro, pri kio oni povis legi en Bulteno. Ĉiuj rezervitaj lokoj estas jam okupitaj. Ĉi-okaze oni klopodos pri nova kantaro-, terminaro- kaj regular-kajereto, ankaŭ pri muzikkasedo, kiu poste estus aĉetebla. Kolego Geroldinger invitis al la tuj sekvanta aŭstria skisemajno en „Maria Alm“. Oni atentigas pri la 61a GEA-kongreso en Bad Säckingen Pentekoston 1983.

Malpacience ni atendas la aliĝilon por la 35a IFEF-kongreso, kiu okazos en la urbocentra kongresejo de Oostende de la 4a ĝis la 10a de Junio 1983. GEFA havos tie denove kvin voĉdonratajn komitatanojn. Por akcepti la 27a jar-kunvenon de GEFA preparas sin Lüneburg

(7. — 9. 10. 1983) apud la tiel prikantata erikejo. En 1984 la vico estas je fervoja distrikto Kolonjo. Emerituloj estos invitataj supozeble al Hannover en Aŭgusto / Septembro venontjare. IFEF revidiĝos 1984 en Bulgario festante sian 75-jaran jubileon.

Multajn temojn ankoraŭ traktis la kunsido en tiu sabato inter la 8.30 h kaj la 12.00 h: pri enketiloj, kotizoj, FISAIC, aliĝiloj, Fervoja Esperanto-Revuo. Interesas, ke baza valuto de IFEF-kotizoj estos denove la Svisa Franko pro multe da perdo en Danaj Kronoj. Por la GEFA-memoralbumo kolego Ritterspach petas ankoraŭ fotojn, negativojn aŭ diapozitivojn el la jaroj 1958, 1967 Fulda, 1959 Dortmund. La Centran Bibliotekon nove ordigas kolego Rösemann.

Klerige turisme

Framtrabaj frontonoj kaj ardezaj fasadoj,

domina katedralo kaj reganta kastelo ne estis la solaj atestantoj historiaj, kiuj logis sabaton matene trupeton de nefunkciuloj tra Friedberg, sub gvido de entuziasma indiĝeno, sed feliĉe kun helpo de sperta interpretisto, d-ro Brodt, kiu sciis efiĉe klarigi la esencen de l'romia pasinto ĝis imperiestro Frederiko la Ruĝbarbulo (1152 — 1190). Regna kastelo de la 12a jarcento, plej granda kastelo germana laŭ areo, Friedberg nur en la 13a jarcento akiris komercan signifon, pro ĝia liberco kaj foiroj.

Plej bela, brila vetero estis rezervita al la sabata posttagmezo, kiam du aŭtobusoj veturigis la ekskursanojn tra sudaj Taunus-regionoj. Etimologie interesa estas la origina nomo Friedberg: fortika kolonio surmonta „Tun - Taun - Town“. Romianoj latinigis la vorton al „Taunus“, kiel erare de la 18a jarcento oni nomis la tutan najbaran montaron. Unua halto vidigis al la ekskursanoj la heslandan parkon, fakte subĉielan muzeon pri vilaĝoj, domoj, preĝejoj, etindustriaj produktaĵoj por oleo, fero, greno, kamparanaj sidejoj kaj diversaj ekspozicioj, ĉu pri naturprotektado, ĉu pri sociaj problemoj ne nur hodiaŭaj.

„Neniam tiel multe mi aŭdis pri Hitler kaj Tria Regno“ rimarkigis pluraj ekskursanoj, kiam la aŭtobusoj proksimiĝis al la aglonestego „Adlerhorst“, hodiaŭ denove sub protekto de la germana armeo, siatempe ĉefkomandejo por la okcidenta militfronto. Cikatroj ĉie videblas en montoj kiel svisa fromaĝo.

Festaveste kaj solene

Progsimiĝante al pompa betonkonstruaĵo en la apudurba parkzono oni ja iom miras, ke Friedberg povas permesi al si tian kongresdomon, sed laŭ la programoj ĝi evidente estas bone okupata dum la tuta jaro. Tie okazis ĉiuj kunsidoj, komunaj manĝoj, ekzamenoj, ekspozicio, libro-vendado, festaj, diboĉaj kaj solenaj kunestoj.

Sabaton fruvespere multaj bale vestitaj homoj pilgrimis piede, taksie, aŭtobuse tra nebulseka malhelo al la lumture vokanta kongresejo. Akurate je la 19.30 h ekkoncertis Peter Freund, kiu akompanis la enkondukon kaj same lerte dancmuzikis modere aŭ vikle post la oficiala programo. Egon Kiefer kiel Bba Ffm

malferme salutis; poste prezidanto Gießner prezentis la honorajn gastojn, kiuj laŭ deca ordo faris siajn riverencojn. Menciindas ankaŭ, ke unuafoje post nepensebla tempo la ĉefestraro de BSW ne sendis oficialulon, ankaŭ reprezentanto de la Eŭropa Asocio de Fervojistoj (AEC) ne ĉeestis, malgraŭ la fakto, ke multaj IFEF-anoj el pluraj landoj membriĝis kaj aktivis tie pro nia insista varbado.

Kiel reprezentanto de BSW Ffm kaj por HV BSW diris kolego Mayer: „La malfacilaĵoj kun la ĝenerala neglekto de kulturaj aferoj, demonstros, ke la politikistoj de nia mondo ankoraŭ ne estas maturaj“ (aŭ jam ne? aŭt.) La simpatia urbestro d-ro Fuhr parolis pri amika kunlaboro kun BSW kaj DB, salutis en flua Esperanto la kunvenintojn, speciale estraron, esperantistajn gastojn el la ĝemela urbo kaj sian magistratan kolegon Geroldinger el Linz. Kiel estro de la magistrato en Friedberg, membro en la ĉefestraro de la fervojaj personaraj reprezentantoj, membro de GdED (kaj kiom da oficoj ankoraŭ) kolego Binding transdiris salutojn de siaj institucioj.

S-ino Bouvet el Villiers sur Marne salutis flanke de esperantistoj kaj magistrato de la partnera urbo. Vicstaciestro Reichel, stacio Friedberg, klarigis la ampleksan taskaron de la ĉi-lokaj kolegoj kaj strukturon de sia distrikto. Por la sindikato GDBA la loka estro kolego Voß prezentis siajn salutojn. Elsbeth Bormann, prezidanto de GEA, akcentas la gravecon de la faka organizaĵo.

Post koncerta intermezo sin prezentas la reprezentantoj de la eksterlandaj fervojistaj asocioj: kol. Geroldinger por Aŭstrio, de Sutter por Belgio, Horn por Francio, Bultmann por Nederlando, Fichter por Svislando. D-ro Bormann, komitatano de UEA, direktoro de la Germana Esperanto-Instituto kaj membro de la Esperanto-Akademio sciis apreziti precipe la fakan laboron de la fervojistoj kaj sentigis la familiecon tutmondan.

Kulmino de la vespero sendube estis la honorigo de du meritplenaj membroj, kiuj de 25 jaroj laŭ siaj kapabloj senlace laboras por GEFA: Elfriede Kruse kaj Willi Grass.

daŭrigo p. 7

25 Jahre für GEFA tätig

Gleich zwei unserer Mitglieder können in diesem Jahr auf eine 25jährige intensive Tätigkeit für GEFA zurückblicken. Es sind die beiden im Ruhestand befindlichen Mitarbeiter Willi Graß und Elfriede Kruse.

Der Redakteur des „Bulteno“ und 2. Vorsitzender der Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten, **Willi Graß**, übernahm im Jahre 1957 das Amt des Bezirksbeauftragten für Esperanto im DB-Bezirk Wuppertal, das er bis zur Bezirksauflösung beibehielt. 1967 übernahm er die Redaktion für das Bulteno, die er heute noch inne hat. Mit der Umbildung des GEFA-Vorstands im Jahre 1972 wurde er auch 2. Vorsitzender und damit Mitglied des Arbeitsausschusses Esperanto beim BSW-Hauptvorstand. In dieser Eigenschaft bereitet er alljährlich zusammen mit dem jeweils zuständigen Bezirksbeauftragten die Jahresversammlung vor. Eine Selbstverständlichkeit war es für ihn, sich für das LKK des 33. IFEF-Kongresses in Regensburg zur Verfügung zu stellen, indem er das verantwortungsvolle Amt des Kassierers übernahm. Auch im 19. IFEF-Kongreß Fulda hatte er schon als Helfer seinen Mann gestanden. Vom 10. Kongreß an (1958) hat er ohne Unterbrechung an allen Kongressen teilgenommen – im letzten Jahrzehnt als IFEF-Komitatano – dgl. an den Jahresversammlungen.

Elfriede Kruse übernahm in dem Ende 1956 gebildeten GEFA-Vorstand das Amt der Sekretärin und bekleidete es in vorbildlicher Weise bis 1975. Sie war damit Mitglied des Arbeitsausschusses Esperanto beim BSW-Hauptvorstand. Seit 1955 hat sie alle IFEF-Kongresse mitgemacht. Im 19. Kongreß Fulda 1967 und im 33. Kongreß Regensburg war sie LKK-Sekretärin. In den Allgemeinen Weltkongressen Mainz (1958) und Hamburg (1974) gehörte sie zur GEFA-Mannschaft im dortigen DB-Schalter. Lange Jahre war und ist sie auch für IFEF tätig, so daß man ihre vielen Aufgaben kaum voneinander trennen kann. So übernahm sie zusätzlich das Amt der IFEF-Sekretärin von 1968 bis 1980. Der Gründer des Internationalen Esperanto Museums in Wien nahm sie – eine hohe Auszeichnung – unter die „Freunde Hugo Steiners“ auf. Häufig hat sie GEFA und IFEF bei ausländischen Veranstaltungen

vertreten. Die Existenz des japanischen IFEF-Landesverbandes ist zu einem großen Teil ihr Werk. Seit vielen Jahren bereitet sie den Boden für die IFEF-Skiwochen vor und übernahm einen großen Teil der Organisation, soweit sie in der Bundesrepublik stattfanden. Ihre Idee war der Literaturwettbewerb im Kongreß Regensburg. Obwohl seit mehreren Jahren im Ruhestand, sorgt sie weiter für die Betreuung unserer älteren und alten Mitglieder und führt die Rechnungslegung über die Haushaltsmittel des Beauftragten beim BSW-HV. Ihre umfangreiche Tätigkeit wurde 1975 im Jahre der Frau durch Verleihung der FISAIC-Goldmedaille und 1980 durch Ernennung zum IFEF-Ehrenmitglied gewürdigt.



**GEFA-Präsident Gießner
gratuliert E. Kruse und W. Graß**

4 Fotos: W. Ullmann

Fürwahr eine unwägbare Menge Arbeit, die hier mit wenigen dünnen Worten und nur in ganz groben Umrissen gezeichnet werden konnte. Und nur, wer sich selbst mit der Materie dauernd befaßt, kann das Maß an Pflichtbewußtsein und Hingabe ermessen, das mit einem Vierteljahrhundert

solcher Tätigkeit verbunden ist. Hingabe an eine Sache, die mehr ist als „Hobby“, mehr als reine Freizeitbeschäftigung und Freizeitgenuss. Eine Sache, die dem Menschen, der ihren Wert erkannt hat und sich danach verhält, einen Inhalt fürs Leben vermittelt und es ihm ermöglicht, anderen Menschen zu dienen, sie zu erfreuen und über alle Grenzen hinweg nicht nur von Freundschaft zu reden, sondern sie zu verwirklichen. Besonders das letzte haben unsere beiden Jubilare immer getan. Sie haben Freunde in vielen Ländern und beweisen praktisch, wie man für das friedliche Zusammenleben der Menschen und Völker wirken kann.

So können wir nur danken für die Summe aller Zeit, Kraft und Mühe, die in dieser

langen Zeit aufgebracht wurde, für eine Sache, für die es sich lohnt, all diese kostbaren Attribute menschlichen Daseins einzusetzen. Der Lohn dafür ist nicht in klingender Münze auszudrücken. Der Lohn ist vielmehr das Bewußtsein, seine Kraft für eine gute – und sagen wir es ruhig einmal deutlich – für eine edle Sache gegeben zu haben.

Es bleibt uns nur, Elfriede Kruse und Willi Graß noch viele Jahre Wohlergehen und Leistungsfähigkeit zu wünschen, damit uns – wollen wir ehrlich sein – ihre Tatkraft noch lange erhalten bleiben möge; aber auch, damit sie selbst die Früchte ihres Tuns noch recht oft und lange genießen können.

Gießner

daŭrigo de p. 5

La solenajn partojn kadrumis tenoro Ludwig Fluck kun pianluda akompano per kantoj operaj, folkloraj, operetaj, tradukitaj de prezidanto Gießner. La plengorĝa voĉo ĉiam denove elvokis etuziasmajn aplaŭdegojn. Sufiĉe malfrue, sed des pli impete la dancemuloj uzis la liberan terenon kaj oni diras, ke la lastaj ankoraŭ gajis post la dua en siaj ĉambroj, tute dece.

La matineo domaĝe ne vidigis la kunintereso atenditan filmon pri la hungara IFEF-kongreso. GEA-prezidanto s-ino Bormann atentigis pri la eŭropaj aktivecoj, pri kiuj oni ofte aŭdas, sed kies efikojn oni neniam rimarkas.

Sinjoro Rösler deklamis plurajn verkojn el la „Verda Relo“, literatura konkurso el la Regensburga kongreso de IFEF. Menciinde pli da publiko estis kunveninta ĉi tie ol dum la origina recitado. Kion fervojistoj verkis poezie aŭ proze el sia ĉiutago aŭ pri elstaraj fervojaj eventoj, tio intertempe aperis en presita broŝuro, ricevebla ĉe GEFA (E. Kruse) por 15,— gm

Elfriede Kruse ankaŭ raportis pri la grandaj progresoj en „Bona Espero“, kie per subteno de fervojistoj esperantistaj oni povis multe restaŭri, evoluigi al memstareco, ripari kaj instali helpajn teknikojn. Grandan dankon infanoj,

instruistoj kaj gvidantoj de BE transdiras al la GEFA-anoj kaj ĉiuj helpantoj.

La raporto de la prezidanto ja aperas aliloke, sed ni certe rajtas komenti liajn pripensindajn vortojn. Ne nur de hodiaŭ multaj volas havi ion kaj nur malmultaj aktive laboras; tio estas la ĝenerala tendenco de nia postmilita socio. En ĝi ne plu solidare, persone, ame kaj memkompreneble unu zorgas pri la alia, pri sia proksimulo kiel diras la kristanoj. Sed en tempo, kiam kristanismo estas partia epiteto, kiam atombombo estas ekvilibra pacigilo, ni ne miru, ke triumfas egoismo, ke potencaj fortoj malkaŝe fuŝinforme, ne nur montras, sed per novaj informteknikoj realigas sian intereson, ne klerigi la homon nuntempan, sed manipuli homaron je kiel ajn utiligebla amora amaso.

Ĉu ni ne devas esti feliĉaj, trovi ankoraŭ tiom da individuistoj inter ni, kiuj idealisme pretas sian taskon, starigi sin kontraŭ torentoj de nescio, neglekto, egoismo? Jen kaj jen aperas, sufiĉe malofte, nova vizaĝo inter ni, nova kunbatalanto. Ĉiam ni trovas denove diligentajn kunlaborantojn por organizi lokajn, landajn, internaciajn kunvenojn. Multaj gutoj konsistigas riveron. Ankaŭ en sekaj jaroj la fluejo restadas. Okaza torento povas detrui ĝin. Ĉu ne jam vidiĝas lumstrio, sunradio post diluvo?

wbr

Jarraporto

pri la periodo de la 25a ĝis la 26a jarkunveno (1981/82)

Enkonduko

La unua penso estu por la mortintoj: Kvankam ĉi-jare la morto ne tro forte batis, ni tamen devas anonci la forpason de du membroj, nome

Fritz Lipka, Bielefeld (73) kaj
Margarete Lünstedt, Herzberg (66)

kaj ni ne forgesu, ke d-ro Emile Schlesser, ĝenerala prezidanto de FISAIC, forpasis en Novembro 1981.

Ili ripozu pace!

1. Organizaj aferoj

1.1. Membrostato

GEFA pagis kotizojn por 811 individuaj kaj korporativaj membroj al IFEF. Sekve, kiel jam en pasintaj jaroj, ni rajtis disponigi 5 komitatanojn por IFEF. La nombro de la individuaj membroj denove iom regresis al 486. Tiu konstato, kvankam ĝusta, estas enigma, ĉar, kiel ĉiujare, ankaŭ por 1981 estas anoncigitaj 42 personoj, kiuj ne nur partoprenis, sed eĉ finis la kursojn. Kie ili nur restis? Ĉu neniu el ili membriĝis? Aŭ ĉu jes, sed aliflanke eĉ pli da membroj ekŝiĝis? La mortintoj ja ne kaŭzis la pardonon. La distriktkomisiitoj estas petataj, ĉi-rilate priatenti la ŝanĝitajn demandojn en la venontjara demandilo sub punkto 2.

1.2. Kunlaborantoj

La laborkonsilantaro kunvenis dufoje kun la distriktkomisiitoj kaj la komisiitoj por specialaj taskoj, nome en Offenbach (Oktober) kaj en Würzburg (Marto). Neniu personaraj ŝanĝoj.

1.3. Kursoj

La ĉi-supraj, sub 1.1. faritaj rimarkoj pri la kursanoj, fariĝintaj membroj aŭ ne, tuŝas la saman temon, traktitan en la pasintjara jarraporto sub 1.3. Ni nur povas konstati similan situacion: Tro malmulte da kursoj (7) sen registrebla efiko. Kaj ni nur denove povas admoni, ke unuavice la kursestroj zorgu, ke kiel eble plej multe da kursanoj membriĝas. Helpu ĉiuj!

2. Kunlaboro en IFEF

La 34a IFEF-kongreso okazis de la 2a ĝis

8a de Majo en Balatonfüred (H). Post longa tempo (1968 BG, 1971 YU) ĝi denove okazis en orienta lando. Ĝi allogis ankaŭ fortan germanan grupon (80). Re prezentis nin tie kiel komitatanoj **Grass, Herlitze, Ritterspach, Rösemann, Schrapp**, en la dua kunsido ankaŭ **Schindler** kiel anstataŭanto. Pro demisio de la IFEF-redaktoro la ĝisnuna sekretario Olsen transprenis ties postenon. Por la ofico de la vakanta IFEF-sekretario elektigis unuanime nia germana membro Otto Rösemann. J. Giessner denove elektigis prezidanto de IFEF.

La **fakprelego** estas legebla en „Internacia Fervojoisto“ n-ro 4/82. En ĝi dipl. inĝ. J. Gulyas traktis ne nur hungarajn, sed ĉefe tuteŭropajn problemojn, tre interesajn por ĉiu fervojoisto, eĉ nefervojoisto. Kelkpaĝa germanlingva resumo estas transdonita al diversaj interesuloj, ĉefe en la distriktoj Frankfurt, Hannover, Köln. Kiel kutime ankaŭ la Dokumenta Servo de DB ricevus la kompletan prelegon. Kolego **Ritterspach** krome legis ĝin en la SAT-kongreso Basel.

Kolego **Hartig** ankaŭ ĉi-jare eldonis kelkajn n-rojn de la **Terminara Kuriero**, per kiu li denove konsiderinde progresigis la laboron de la Terminara Komisiono. Ties sekretario Ritterspach (samtempe sekretario de la Fakprelega Komisiono) grave helpis en la revizio de la hungara fakprelego kaj sukcese kunlaboras kun la gvidanto de la FK, Thuesen (DK).

3. Kontaktoj, aranĝoj

Ĉar la 33a IFEF-kongreso Regensburg „formaniĝis“ multe da fortoj kaj rimedoj, ni rezignis je la kutima publika jarkunveno, sed aranĝis ĝin kiel **laborkunvenon** de la laborkonsilantaro kun la komisiitoj de la 10a ĝis 12a de Oktobero 1981 en Offenbach. Abunda tagordo estis traktita dum sabato kaj dimanĉo. Sed certe ankaŭ la ekskurso al la kastelo Mespelbrunn restos en agrabla memoro. Okaze de la Nogelo-renkontiĝo kaj 75jara grupo-jubileo en Bremen (Oktober 1981) Joachim Giessner kaj Elfriede Kruse ricevis la **meritkrucon** de Germana Esperanto-Asocio.

GEA festis sian 60an kongreson en Münster (W). Organizis ĝin niaj tieaj kolegoj **Brandenburg** kaj **Schrapp** kun siaj edzinoj. Ĉeestis inter alie kolegoj Giessner kaj Rösemann, por partopreni en fond-kunveno de speciala komisiono por preparado de la 100jara jubileo de Esperanto en 1987. Ili reprezentos IFEF en tiu komisiono.

Kelkaj membroj partoprenis en la UK Antwerpen (B) kaj aliaj en la 23a IFEF-skisemajno en Morzine (F).

La kontaktoj al BSW estis kontentigaj kiel ĉiam.

4. Informado, varbado

4.1. „**Bulteno**“ aperis kvinfoje (n-roj 5/81 ĝis 4/82) kun 44 paĝoj kaj 13 fotoj. Prave la redaktoro plendas, ke el la lokaj grupoj venas tro malmulte da kontribuajtoj. Se li havus tiajn raportojn, la informa kaj instiga karaktero de „**Bulteno**“ povus esti pli akcentita, kvankam la paĝonombro apenaŭ povus kreski, simple pro limigitaj monrimedoj. Do kuraĝe verku kaj traduku.

4.2. En la oficialaj Bultenoj de DB (Amtsblätter) kaj en regionaj komunikiloj de BSW ni konstatis 9, en tagaj gazetoj 34 publikaĵojn pri nia laboro.

Ni menciuj ankoraŭ, ke la kolegoj Barnickel kaj Ritterspach prilaboris Esperanto-eldonaĵon de bela prospekto de la urbo Frankfurt/Main.

4.3. Varbado

En la distrikto Essen eblis partopreni en la konata „Test 5000“ de GEJ. La inform-bilobilo indikis la adreson de la distrikt-komisiito. Ankaŭ el la distriktoj Frankfurt, Köln kaj München estas anoncitaj sinceraj klopodoj pri informado i.a. ĉe AEC, sindikatoj kaj junuloj. Precipe dankinde estas, ke GdED denove presis por ni 5000 ekzemplerojn de la bonkvalita varbilo „**Esperanto**“. Ĝin kaj la konatan flavan varbilon ni intercisis uzi en nova varbkampanjo, kiu devis komenciĝi en Septembro 1982 helpe de anonco en la revuo „**Wir**“. Bedaŭrinde tiu intenco fiaskis, almenaŭ provizore, ĉar la anonco ne aperis en Septembro. Ni tuj skribe plendis ĉe la redakto kun la rezulto, ke la anonco aperis en Oktobro.

Bedaŭrinde ĝis nun ĉiuj klopodoj estis

vanaj trovi respondeculon por la ofico „**Informado/Varbado**“.

5. Emerituloj

La ĉi-jara kunveno de la emerituloj okazis la 4an de Septembro en Würzburg. 34 personoj sekvis la invitojn, kiujn dissendis kolegino Kruse. Ŝi mem ne povis partopreni. Gvidis la kunvenon kolego Giessner. Aparta raporto aperas en ĉi-tiu numero.

Kompilis Giessner

La matinea parolado de GEFA-prezidanto Giessner

Hieraŭ ni jam tuŝis kelkajn punktojn, ekz. membrostaton, informadon, varbadon, aktivecoj kaj neaktiveco.

Ĉiujare jam de jaroj la sama „**kanto**“. Vole nevole altrudiĝas la konkludo: aŭ pliakiviĝi aŭ itage renkonti fiaskon. Iam estis pli ol 600 membroj, nun ĉ. 480. Se ili ĉiuj estus aktivaj, tiam ne estus granda problemo, sed nur malmultaj pretas doni ion al GEFA kaj IFEF, la plej multaj nur volas „**havi**“, ĝui, eble kritiki. Pli kaj pli ni glitas al la stato de (en IFEF) malgranda asocio resp. en BSW sensignifa kultura grupo. Ofte mi aŭdas riproĉojn flanke de HV, plej ofte senkaŭzajn. — Ili ja ne diferencas inter tiaj kulturaj grupoj, kiuj agas preskaŭ nur pro sia propra plezuro (ekz. kartludantoj, ŝakludantoj, filatelistoj), kaj tiaj kiel ni.

Estis jam ĉiam dornoplena vojo por la esperantistoj, sed nun eĉ multe pli, ĉar aldona la televido estas la malamiko ne nur de la familia vivo, sed de ĉio krea agado. — Kiom da esperantistoj, kiuj principe asertas, ke ili neniam havas tempon por iom kunhelpi por funkciado de nia afero, tamen ofte aŭ eĉ ĉiutage trovas tempon por la diabla aparato kaj trovas tion tute normala.

Jes, tio estas la stato. Mi menciuj enigmon. Ĉiujare la raportoj de niaj distriktkomisiitoj anoncas kursojn, mezgrade 6–8 kun mezgrade 30–40 da fininaj kursanoj. Se ili membriĝus ĉe GEFA, ni bone kreskus. Sed kie ili restas? Kiu solvas tiun enigmon? Se nur tio funkcius, neniam ni bezonus elspezi nian monon por anoncoj.

Mi tamen deziras substreki, ke estas inter ni kelkaj amikoj, kiuj ekkonas la situacion, fidine laboras, senhezite transprenas

taskojn aŭ mem ekkonas taskojn. Al ili mi speciale dankas. Ili estas tiuj, kiuj zorgas, ke tamen ankoraŭ la ĉaro ruliĝas. Ili ankaŭ estas speco de konsolo por mi. Ili donas la certecon, ke oni ne estas sola. Tamen ni bezonas pli da tiaj

kunagantoj. Se multaj transprenas nur iom, tiuj iom-oj konsiderinde helpas al la tuto. Bv. kunporti tiun peton al via ĉiutago kaj serĉu eblecojn por sekvi ĝin praktike. Venos la tempo, ke novaj vizaĝoj devos aperi sur la scenejo.

Unsere Pensionäre in Würzburg

Der 4. September war ein herrlicher, sonniger Tag, als sich 35 Personen in der Bahnhofsgaststätte in Würzburg trafen. 86 Jahre war der älteste unter den Kollegen, die aus Bremen und Hamburg, aus München und Berlin angereist waren, um einige Stunden in der Gemeinschaft alter Bekannter zu verleben. Wie immer hatte Elfriede Kruse, die selbst nicht anwesend sein konnte, die Veranstaltung vorzüglich vorbereitet.

Der Beauftragte des Hauptvorstandes des BSW, Joachim Gießner, hieß die Anwesenden herzlich willkommen. Er betonte,

daß diese Art Zusammenkünfte nun schon fast 10 Jahre durchgeführt werden. Sie sollen allen, die wegen Alters oder Krankheit keine Kongresse und Jahresversammlungen mehr besuchen können, Gelegenheit bieten, wenigstens einige Stunden die alte Gemeinschaft wieder erleben zu dürfen. Dem Hauptvorstand BSW sei an dieser Stelle besonders dafür gedankt, daß er durch großzügige Unterstützung diese Altentreffen ermöglicht.

Jeder der Anwesenden stellte sich kurz vor und schilderte, wann und warum er Esperanto gelernt hatte. Manch interessante Einzelheit kam dabei zutage. Eine



Unsere Senioren in Würzburg

foto: G. Bartz

Witwe bedauerte, mit der Internationalen Sprache erst im Rentenalter in Berührung gekommen zu sein. Ein anderer hatte 1946 etwas über Esperanto gelesen und daraufhin mit dem Sprachstudium begonnen. Dabei lernte er seine Frau kennen, die im gleichen Kursus war. In mehreren Familien hat sich erfreulicherweise die Sprache schon über die Kinder bis auf die Enkel vererbt. Der Berliner Kollege hatte gar schon im Jahre 1912, damals in Stuttgart, Esperanto gelernt.

Und noch etwas zeigte sich sehr deutlich: so mancher ältere Eisenbahner-Esperantist fühlt sich noch längst nicht als „altes Eisen“. Nicht nur den Ruhestand genießen, ist die Devise, sondern auch sich nützlich machen. Einer gebrauchte den Ausdruck „Unruhe-Stand“. Und was in

der Diskussion besonders betont wurde, war der Dank an die Ehefrauen für die oft lebenslange moralische Unterstützung und Hilfe, ohne die eine Tätigkeit wie die unsere in einer Freizeitorganisation unmöglich wäre.

Nach dem gemeinsamen Mittagessen lockte die Sonne hinaus. Ein kleiner Stadtbummel führte zum Dom und Markt und zum blumengeschmückten Mainufer. Bei einer Tasse Kaffee fand das Treffen dann seinen Abschluß. Alle waren sich einig, daß wir uns im nächsten Jahr wiedersehen wollten. Dann vielleicht ein Stück weiter nördlich. Wir hoffen darauf. Und sicherlich hat jeder etwas Positives aus Würzburg mitgenommen und die Gewißheit, daß er nicht vergessen ist.

Gi

Literatura Konkurso

Post la originala poemo de Jarke Pol (ĈSSR), kiun ni publikigis en Bulteno 2/82 ni nun aperigos el la vico de tradukita prozo (iom mallongigitan) kontribuon de nia germana kolego Fritz Busse.. Ĝi same ne apartenas al la premiitaj aŭ laŭde menciitaj verkoj, sed ĝi estas leginda prozaĵo kaj ni ne volas reteni ĝin al niaj legantoj.

La granda rabo en la London-Paris-Ekspreso

1855. Mortiga milito furiozas sur la Krimeo. Kaj en Londono estas planata jarcentkrimo. Unufoje monate du monŝrankoj en la pakajvagono de la London-Paris-Ekspreso enhavas la salajron por la trupoj de la brita armeo en Ruslando: gisbrikoj el oro en valoro de 12 000 sterlingaj pundoj. La vagono estas severe gardita, la monŝrankoj sekuritaj kontraŭ rompŝtelo. Kvar ŝlosilojn, garditajn de fidinaj viroj, deponitajn en diversaj lokoj, oni bezonas por ilin malŝlosi.

22a de Majo: la monata orekspedaĵo estas kargata en London. Kiam la trajno alvenas en Folkestone apud la Manika Kanalo, kuŝas en la monŝrankoj — plumbo. Nekredebla okazaĵo.

La ruzege planita kaj malrespekte realigita faro estas la verko de Edmund

Pierce. La bonaspekta, kultivita, ĉarma kaj senskrupula gentleman-krimulo estas la estro de la bando. Komplicoj estas lia bela, prudenta amatino, la ŝanĝigkapabla aktorino Miriam, Agar, la viro kun la lertaj fingroj, al kiu neniu seruro konstruaŝtaro, kaj la malgajega Barlow kun blanka cikatro surfrunte.

En la mezo de la 19a jarcento, antaŭ la invento de tranĉobrulilo kaj dinamito, ekzistis nur unu sola ebleco malfermi monŝrankon: per ŝlosilo. Tial la „havigado“ de vaksaj negativoj de la kvar ŝlosiloj estas la ĉefaĵo de la Pierce plano. La unuajn du havigis al li la precipe por tiu „laboro“ el la malliberejo liberigita fifama grimpestelito siatempa.

Por havigi al si la trian, Pierce devas konkeri la koron de pruda belulino el nobla domo. La kvaran ŝlosilon fine oni nerimarkite forprenis de bankdirektoro en iu por li aranĝita mallonga aminduma nokto. Sed restas ankoraŭ multo por fari, ĝis kiam Pierce post makabra sceno ĉe la stacidomo finfine povas eniri la trajnon, por inter Londono kaj Folkestone realigisian majstraĵon

Kvardek minutojn post la ekveturo el Londono la matena trajno de la South Eastern Railway atingis sian maksimuman rapidecon de kvindek kvin mejloj en horo. Malantaŭ la spireganta lokomotivo sekvis naŭ pasaĝervagonoj. Je la fino de la

trajno troviĝis griza, senfenestra pakajvagono. Troviĝis en ĝi du gardistoj, Pierce kaj la en ĉerko kuntransportita ŝlosil-specialisto Agar kun la tasko, prirabi la monŝrankojn.

Dum la trajno bruante vaporis renkonte al la marbordo, subite malfermiĝis la ŝovebla pordo de la pakajvagono kaj permesis rigardon al furioza batalo okazanta interne de la vagono. Estis batalo sub plej malsamaj fortoj: negrasa juna viro en eluzita uniformo ekbatis fortikan bluuniformitan gardiston de la fervoja kompanio. Kvankam de pli malforta konstitucio la juna viro brave sin tenis kaj eĉ donis al la jam kaŭriĝanta kontraŭulo unu, du pezajn boksbatojn. Sed la gardisto faris subite salton antaŭen, kiu la junan viron trafis nepreparate kaj ĵetis lin tra la malfermita pordo eksteren, tiel ke li plurfroje transkapiĝis kiel pluŝpupo kaj fine restis kuŝanta surtere.

Agar uzis tiun ŝancon kaj ĵetis eksteren ĉiujn pretigitajn ledosaketojn kun la orobrikoj. Post tio li fermis la ŝoveblan pordon.

Post unu, du minutoj la elĵetita viro sin movis. Kvazaŭ sub fortaj doloroj li sin rektiĝis sur kubuto. Laŭŝajne li rekonsciĝis, sed liaj klopodoj estis vanaj kaj li denove refalis teren. Lasta konvulsia skuo trakuris lian korpon, kaj li restis kuŝanta senmove.

Duonan horon poste elegante nigra kaleŝo kun malhelruĝaj radoj malsupren ruliĝis la kampan vojon paralelan kun la fervojo. La kaleŝo proksimiĝis al monteto, kie la veturigisto haltigis la ĉevalon. Eliris la kaleŝon laŭmode vestiita sinjoro. Li surgrimpis la monteton, prenis binoklon al la okuloj kaj rigardis laŭlonge la relvojon. Tuj li ekkonis la tie kuŝantan viron kaj la ledosaketojn. Sed la sinjoro nenion entreprenis proksimiĝi al li aŭ lin helpi. Kontraŭe, li restis staranta sur la monteto ĝis kiam li estis konvinkiĝinta, ke la viro estis morta. Nur nun li sin turnis kaj kviete iris malsupren por porti la kvin ledosaketojn kun la oro en la kaleŝon. La sinjoro, estis Barlow, eniris kaj veturis en la direkton, el kiu li estis veninta, norden, al Londono.

Postrimarkoj:

La antaŭpreparoj por tiu ĉi diabla plano kompreneble ne ĉiam iris glate. Kvankam la komplikoj estis rafinitaj bandanoj, ili ofte staris antaŭ grandaj problemoj. Sekvis fiasko post fiasko.

Post la komplika havigo de vaksaj negativoj, Pierce meze de Julio 1854 posedis ĉiujn kvar kopiitajn ŝlosilojn. Nun nepre necesis esplori la sekurecistemon de la du monŝrankoj.

Per ruaĵo f-ino Miriam eksciis ĉion sciindan ĉe la produktanta firmo Chubb.

Je la 22a de Majo 1855 staris apud la pakajvagono de la trajno al Folkestone ĉareto kun ĉerko sur ĝi. Juna knabino nigre vestita staris apude kaj ploregante persistis pri tranporto de sia mortinta frato (!) al Folkestone. Spite al strikta malpermeso la ĉerko sub dramatikaj pretekstoj estis kargita. Samtempe du viroj enen ŝmuglis — sub ŝirmo de komplikoj en policanaj uniformoj — kvin ledosaketojn plenajn de plumbokugloj. Intertempe estis alveninta la severe gardita orosendaĵo. Sub la kontrolo de la bankdirektoro Fowler la orobrikoj estis unuope ŝovitaj en la monŝrankojn kaj zorgeme ŝlositaj. Post tio oni fermis la glitpordon de la pakajvagono kaj ĝin sekurigis per stabila pendseruro. Ho ve! La bandanoj surpriziĝis: neniu havis ŝlosilon por tio. Sed unu el ili bone observis la konstrutipon de la seruro

Lastmomente Pierce, Miriam kaj bankdirektoro Fowler haste eniris fumantkupeon unuklasan. Nefumanto Fowler baldaŭ retiriĝis en alian kupeon. Miriam tuj lin sekvis kaj ĉiurimede maleblis kontakton kun Pierce. En ties pakaĵo troviĝis montgrimpista ekipaĵo, vestaĵoj por sin alivesti kaj ŝlosilaro. Dum la veturado li saltis kaj rampis de unu vagono al la alia ĝis la pakajvagono, tie malfermis la surtegmentan ventoladklapon kaj enigis ŝnuron kun kontraŭhoko. Agar, kiu intertempe de la subaĉetita gardisto estis liberigita el la ĉerko, jam estis interŝanĝinta la oron kontraŭ la plumbo, sen difekti la monŝrankojn. Tuj poste aŭdiĝis frapoj. Pierce, pendante ĉe la ŝnuro, malŝlosis la seruron ĉe la flanko pordo kaj eniris. Agar radiis pro kontento. Unu el la gardistoj paliĝis krete blanke. La ledosaketoj kuŝis pretaj por esti ĵetotaj el

la pakaĵvagono. Tuj poste komenciĝis la interbatiĝo kiel jam rakontite. La oro neniam retroviĝis.

**Angla teksto de Michael Chrichton
Germanigis Hans-Joachim Maas
El la germana tradukis Fritz Busse**

Telekomunika Vortaro

Okaze de la jaro pri komunikado en 1983, mi pretigas esperantigvan telekomunikvan vortaron. Pro tio, mi alvokas ĉiujn helpemajn fakulojn peti de mi la trilingvan vortaron (francan, anglan kaj hispanan), kaj proponi esperantajn tradukojn por kiel eble plej multe da enaj terminoj.

Bonvolu skribi rekte al:

Inĝ. C. Bertin, CCETT – VRE/TDP –
B.P. 1266 - F. 35013 RENNES CEDEX,
FRANCIO

S-ro C. Bertin aktive kunlaboris en TK.

Voĉon de leganto

34a IFEF-kongreso en Hungario
En la bonskribita kaj interesa kongresresumo (Bulteno 3/82, paĝo 6) ni ankaŭ legis: „Ne tro bonan impreson postlasis la internacia balo pro la limigitaj lokoj kaj la malpermeso konsumi trinkaĵojn en la salonego“.

Mi devas diri, ke tute kontraŭe la internacia balo por ni postlasis bonegan impreson. Bedaŭrinde la plej multaj vizitantoj de niaj baloj nur venas por rigardi, (mi evitas la vorton gapi) aŭ nur volas babilu kaj okupas multajn sidlokojn. Sed balo estas aranĝo por dancemuloj. En Balatonfüred la dancemuloj havis multe da loko, la babilemaj ges-anoj povis kunsidi en la apuda salonoj, kie ĉiuj tre rapide povis ricevi trinkaĵojn.

Tiu „sistemo“ povus esti imitinda ekzemplo por venontaj kongresoj!

Alfred Gissibl

Berichte der Gruppen

Hannover / Bremen

La 16an de Majo okazis la Maja-ekskurso al Ahausen. La 20an de Oktobro je la 20a horo okazis kunveno en nova kunvenejo stacio Bremen Hbf, kajo 1 norde, enirejo al la oficejoj.

La monata kunveno estis aranĝita la 10an de Aŭgusto kiel ĝardenfesto en la kvartalo Walle – eksterurbe – en ĝardena pejzaĝo. Estis 14 geamikoj kune kun en gaja rondo.

La 7an de Septembro fondiĝis diskutrondo. Tiu kunveno okazos ĉiun duan merkredon post la grupkunveno.

Nürnberg / Lichtenfels

La Zamenhof-festo okazos la 14an de Decembro je la 18.30 horo en la gastejo „Wallachei“.

H. Müller hat hervorragend über den IFEF-Kongreß 1982 in der örtlichen Presse berichtet.

Essen

Theodor Gesenhoff, 4400 Münster, ist unserer Vereinigung beigetreten. Dank seines guten Lehrmeisters J. Schrapf hat er schon gute Fortschritte in der Internationalen Sprache gemacht. Herzlich Willkommen und weiterhin viel Freude beim Studium.

Aranĝo

De la 25a de Junio ĝis la 2a de Julio 1983 la Unuiĝo Franca por Esperanto aranĝos Internacian Esperanto-semajnon en Cannes/Francio ĉe la Lazura Marbordo. La prezo, anoncita ĝis la 31.12.82, estas 1850 ffr. incl. ĉion. Oni povas akcepti nur 50 personojn. Petu programon ĉe la koresponda adreso: Internacia Esperanto semajno, „Les Hortensias 2“. Domaine des fleurs, 12 I bis Boulevard Napoleon III, F-06200 Nice. Informojn donos ankaŭ nia kolego Hans Barmaneter, Bf Memmingen, Basa 962/809/357.

Unsere IFEF-Kongresse in den nächsten Jahren:

35. Belgien / Oostende	1983
36. Bulgarien	1984
37. Skandinavien	1985
38. Jugoslawien	1986
39. Frankreich	1987
40. Spanien	1988

(Quelle: Arbeitssitzung
34. IFEF-Kongreß Ungarn 1982)

Ein bißchen Frieden

Melodie von R. Siegel — Text B. Meinunger

Wie eine Blume am Winterbeginn
und so wie ein Feuer im eisigen Wind,
wie eine Puppe, die keiner mehr mag
fühl ich mich an manchem Tag.

Dann seh ich die Wolken, die über uns sind
und höre die Schreie der Vögel im Wind.
Ich singe aus Angst vor dem Dunkel mein
und hoffe, daß nichts geschieht. [Lied.

Ein bißchen Friede, ein bißchen Sonne
für diese Erde, auf der wir wohnen.
Ein bißchen Friede, ein bißchen Freude,
ein bißchen Wärme, das wünsche ich mir.
Ein bißchen Frieden, ein bißchen Träumen,
und daß die Menschen nicht so oft weinen.
Ein bißchen Frieden, ein bißchen Liebe,
daß ich die Hoffnung nie mehr verlier.

Ich weiß, meine Lieder, die ändern nicht viel,
ich bin nur ein Mädchen, das sagt, was es fühlt.
Allein bin ich hilflos, ein Vogel im Wind,
der spürt, daß der Sturm beginnt.

Ein bißchen Friede

Singt mit mir ein kleines Lied,
daß die Welt in Frieden lebt.

Traduko en Esperanto de
Joachim Giessner:

lom da paco

Ja kiel floron ĉe l' vintra komenc'
kaj fajron en venta, glacia potenc'
kaj kiel pupon, ŝatatan ne pli,
min tre ofte sentas mi.

Kaj tiam mi vidas la nubojn sur l' ĉiel',
mi aŭdas la birdojn flugantajn sen cel',
mi kantas en tim' pro obskura minac',
esperas, ke estu pac'.

lom da paco, iom da suno,
por nia tero, por nia nuno.
lom da paco, iom da ĝojo,
iom da varmo mi petas por ni.
lom da paco kaj da revado
kaj por la homoj ne plu plorado.
lom da paco, iom da amo,
estu l' espero ne iluzi'!

Ne pro miaj kantoj ŝanĝiĝas event',
mi estas knabin' nur, kantanta laŭ sent'
senhelpa, soleca, birdet' sen potenc'
kun tim' pro la ŝtorm-komenc'.

lom da paco

Kantu forte nun kun mi,
pac' ne estu utopi'!

Am Weihnachtsbaum die Lichter brennen Sur l' arb' kristnaska

1. Sur l' arb' kristnaska kandela
lumo en festa brilo, varma mild'.
Ĝi kvazaŭ diras: „Jen mi spegulo,
de la esper' serena bild'“.
2. Infanoj kun rigardo hela,
okuloj ridas kaj la kor'.
La oldaj turnas en rav' ĉiela
l'okulojn supren kun ador'.
3. Kaj du anĝeloj senbrue venas,
neniu vidis ilin jen;
al tablo paŝas kaj preĝas,
benas kaj foren iras kun solen'.
4. Ja ne aŭdiĝis l' anĝela diro,
sekreto restis ir' kaj ven'.
Sed en la ĉambro sentiĝas miro,
por ĉiuj restis dia ben'.

tradukis: Joachim Giessner

Leise rieselt der Schnee Ŝvebas neĝ' el aer'

1. Ŝvebas neĝ' el aer', nun ripozas la ter'.
Mondo en brilblanka vest',
ĝoju, ja venos kristfest'.
2. Varma lum' en la kor',
for ĉagreno kaj plor',
ĉesas de l' viv' la molest',
ĝoju, ja venos kristfest'.
3. Baldaŭ nokto de l' glor'.
Kaj el ĉielo la ĥor'
sonos en dolĉa majest',
ĝoju, ja venos kristfest'.

**Al niaj membroj kaj eksterlandaj geamikoj
ni deziras ĝojigan Kristfeston
kaj sukcesplenan Novan Jaron.**

Redaktfino por n-ro 1/83 estas la 15.1.83.